

REDAKTAS KOMITATO.
 Редактира Комитетъ.

ĈEFREDAKTORO: Kapit. ST. RADEV.
 Гл. Редакторъ: Кап. СТ. РАДЕВЪ.

Abonprezo: { Por Bulgarujo - 40 lv.
 Por Eksterlando - 2 sv.
 fr. au egalvaloro.

ADRESO: Redakcio kaj
 Administracio
 RUSE Bulgarujo.

TARIFO de la ANONCOJ:
 Komercaj - 2 lv. kv. sm.
 Korespondaj - 15 lv.

XVII-TI

За седемнадесети пѣтъ ние ще се съберемъ за да направимъ преценка на изминатата година и да опредѣлимъ, набележимъ пѣтищата за следване презъ идущата.

За седемнадесети пѣтъ есперантиститѣ отъ цѣлата страна ще се събератъ, за да прекаратъ нѣколко дни въ атмосфера близка на тѣхъ, атмосфера, напълнена съ чувства и разбирания еднакви.

И при тѣзи сродни чувства и разбирания, и при наличността на една и сѣща тѣй висока, препълнена съ толкова благородностъ цель ще трѣбва да проличатъ и усилията за насаждане на есперантизма.

И при една най-малка равномѣтка ще стане ясно за всѣкиго, че е необходимо по-вече организираностъ, сцепление, координиране усилията. А това се постига не съ пожелания, а съ работа — отъ всѣкиго, всѣкаде и при различни обстановки.

Дано тазгодишния конгресъ донесе съзнанието за по-крепка организираностъ и по-интензивна работа.

ESPERANTISTOJ

Se oni argumenton uzas,
Ke Esperanto ne belsonas,
Ni tian „fakton“ ne rifuzas
Kaj tuj respondon jenan donas:

O jes! „belsone“ sur la tero
Naciaj lingvoj ja dividas
Homaron tutan... estas vero!
Kaj eĉ blinduloj tion vidas....

Sed nia kara Esperanto,
Al am' vokanta la popolojn,
Aperas kiel Dia kanto
Unuiganta ĉies volojn.

S. M. S



MON AMIE

Ne estas jam blueco super ni,
Ne estas ĝojo en la koro,
Ne trilas jam feliĉmemoro,
Vi ne plu amas, mon amiel...

Ho, kiel stultaj iam estis ni
Pensante pri feliĉ' ĉiama,
Ke en ia koro brulas amo,
Ho, vi ne scias, mon amie.

Kaj tute sola revas, kara, mi
Palacojn por vi konstruante,
Sed vian voĉon jam neantan
Mi aŭdas, aŭdas, mon amie.

Krest. Georgiev.



TIU ĈI NUMERO ESTAS DUOBLA.

Гответе се за конгреса!

Всички на конгресъ!

P. Javorov.

P E N T O

Mi neis vin, malbenis iam vin, ho Dio,
 kaj nun mi estas polvruin'...
 Vizaĝon mian ne pekkovras kompatstrio:
 rekonis per kruel' mi via vin!

Mi amas kaj suferas... ĉu sufero al malamo,
 spite,
 ne estas vok'?

Per am', malamo vi leprigis min spirite,
 Kaj mi la lepron nomis amprovok'.

Soleca estas mi: dezerton sentas mi silentan
 kaj ardon de la sun'!

Ripozas la naturo mortinfiferenta...

Mi kial en ĝi estas ŝarĝo nun?

Mi amas, sed ne volas kaj ne revas!

Mi scias nur —

komencon scias mi kaj ne observas

la finon, kie, eble, suĉos min tortur'.

De sur montsuproj mi rigardas, malsuprenkuradas
 laŭ deklivoj,

kaj en abism' perdiĝas mia voj'...

Ne rulis larmo el okul' eksteren: kaj interne lar-
 moj reviviĝis: fiskropioj

en miaj vejnoj trenas sin da tro.

Mi neis vin, mi neis vin, ho Disinjoro... kaj unu
 mi estas en gehen', en flama zono.

Gomveas mi:

Ho Dio, diru ke la kor' fariĝu ŝtono, —

dormigu min por ĉiam frostiglaci'!

trad. Hrima.

Liljanov.

M A L F E L I Ĉ O

— Venu, sinjoro, nur unu levon!

La malgranda ŝuporigisteto Petko, sidinta ĉe la angulo de la strato, matpacience ekfrapadis per la broso la kolorigitan skatoleton. En liaj profundaj okuloj oni povis legi peton kaj maltrankvilecon. Li menciis al ĉiu preterpasanto por si mem, aldonante siajn sekigitajn, nigrigitajn de la ciro manojn kaj larmo sufokis lian trasekiĝintan gorĝon. Ĉar, hodiaŭ li devis

kolekti dek levojn, por aĉeti medikamenton por sia malsana fratino Milka. Sed, ho jen tagmezas, kaj li kolektis nur kvar levojn.

— Venu, venu, sinjoro!

Tien kaj reen la preterpasantaj rapidis ĉiu laŭ sia penso. Petko atendis pacience, alpreminta kun sia nuda piedo la skatoleton. Virojn, virinojn — riĉajn kaj malriĉajn, li petis ĉiun per sia kaduka voĉo. Ĉiam, kiam iu turniĝis al li, li vigle kaj rapide ekkaptadis la broson, kaj lia koro ekbatadis furioze sub la malpurigita ĉemizo. Tamen la preterpasanto foriris kaj Petko je honto mallevadis sub la skatoleto la tremantajn manojn.

— Venu, venu, sinjoro!

— He sufiĉe vi kverelu, hej vi!

Malgrasa, alta sinjoro kun okulvitroj ekrigardis lin per timiga ridardo. Petko pro timo sin fleksiĝis kaj en envio rigardis la sinjoro kun okulvitroj, kiu aĉetis de la proksima magazeno unu el la pendantaj pilkoj preter la fenestro.

— Eh, kial bezonas tiun ĉi pilkon li? Per la mono kiu li donis por ĝi, mi povus aĉeti medikamenton. Se mi havus monon, mi aĉetos neniam similaĵojn.

La popolamaso pli kaj pli grandiĝis. Veturiloj, aŭtobusoj, tremoj kuradis supren, malsupren kaj kune la homaj voĉoj formadis unu senĉesan bruadon. Petko levigis la skatoleton kaj li translokiĝis aliloke sur la strato. Oni puŝis lin, oni insultis lin, sed li malkoleris. Li bezonas dek levojn, sed li kolektis nur ses. Kiel ekĝojos la patrino, kiam li alportos la mono por medikamento? Jom ankoraŭ, kaj li kolektos, la ceteran.

— Venu, venu, sinjoro!

Petko sidis nun ĉe la pordo de unu hotelo. Ĉi tie la popolamaso estis pli malmultenobmra. En ĉi la apuda ĝardeno oni muzikis. La homoj sidis, gaje, paroladis, manĝis kaj trinkis bieron. Delonge pasis tagmezo sed Petko ja nun konjektis, ke li estas malsata. Li enigis la monon en la skatoleton kaj eliris sekan panpeceton.

— Bubo, komencu! Junulo metis sian piedon antaŭ li. Petko tuj kaŝis la panon, kaptis la broson kaj en liaj okuloj vidiĝis gajaj larmoj.

— Pro kio vi tiom ĝojas?

— Ĉar nun . . . la medikamento por Minka. . . . li ne povis esprimi, sed pli fervore ekfrotis la lustritan ŝuon. Kaj lia koro eksentis ĝojon.

— Prenu, knabo!

— Ho, kia bona homo! Nur unu levo kaj li ĝojigos sian patrinon.

— Venu, venu, sinjoro!

Subite li vidis, ke iu lin vokas, por iri la li al alia trotuaro. Du aliaj ŝupurigistetoj sin aldirektis, sed Petko deziris ilin antaŭiri, ĉar li bezonis nur unu levon kaj jam la horo estas kvin. Li kaptis la skatoleton kaj ekkuris tra la strato.

— Atendu, bubaĉo!....

Unu policano provis lin halti, tamen estis malfrue. Petro vidis antaŭ si, la grandan kolorigitan monstron, ekvolis sin returni, sed li glitis kaj falis sur la poluritajn relojn....

La tramo haltis kelkajn paŝojn de la loko de la malfeliĉo.

El bulgara G. D. Trakijski - Ruse.



iv. Sarafov.

ROZA VALO

En la mezo de Bulgarujo, inter la montoj Stara Planina (Hemus) kaj Sredna Gora estas situita la fama, bela kaj alloga Roza Valo. Ĝi estas longa 71 klm., larĝa 8 klm., unu surfaco 560 klm.² alta 350 m. super la mara nivelo. Tra ĝi pasas rivero Tunĝa kun multaj aliaj rapidaj, kristalaj kaj freŝakvaj montaj torentoj. La valo similas je belega ĝardeno, ornamita kun ĉarmaj kaj bukaj arbaretoj, kamparoj, fruktodonaj herbejoj, grandaj nuksoj kaj kaŝtanoj. Sed ĝi estas famigita pro siaj belegaj kaj aromaj rozĝardenoj, kiuj produktas la ĉarmajn rozflorojn, de kiuj ricevas la bonodoran rozoleon. Plej bela, plej alloga kaj kara estas la Roza valo dum Majo kaj Junio, kiam disfloriĝas kaj rikoltas la rozojn. Eliru tiam frumatene en la kamparo kaj vi estas mirigota: la tuta valo odoras dolĉe kaj agrable; la rozaj arbetoj estas ornamitaj per miloj da belaj, ruĝaj, ĵus florigintaj floroj. Ĉirkaŭ la arbetoj vi vidos junajn virinojn kaj virojn, kiuj rikoltas la rozflorojn. La kantoj kaj ĝojaj ridoj de tiuj gajaj rikoltantoj enmiksiĝas kun la trelaj kaj miraj kantoj de la najtingaloj.

La rozfloroj estas rikoltitaj antaŭ la sunapero frumatene kaj metas ilin en ombra kaj malseka loko. Poste ilin enverŝas en grandaj destilejoj kaj unue produktas rozakvon. Denove destiligas tiun rozakvon kaj post tio super la akvo naĝas la bonodora kaj fama rozoleo. Tiu oleo havas fortan kaj agrablan odoron. Oni vendas ĝin tre kare — unu klgr. kostas 120,000 levojn kaj estas vendebla en la tuta mondo.

La historio de la rozolea fabrikado estas tre malhela, pri ĝia komenco nenion oni scias. Oni scias nur ke en antikva tempo en la Balkana duonisulo renkontiĝis rozĝardenoj. Herodoto en sia priskribo pri Macedonio, rakontas pri la rozĝardenoj ke kvazaŭ ili apartenis al Midaso, filo de Gordia. En tiuj ĝardenoj kreskis memkreskintaj rozoj, de kiuj ĉiu havis dek ses foliojn kaj ĉarman bonodoron.

Nun estas konstruitaj multaj grandaj fabrikoj - destilejoj ĉu privataj (la plimulto) ĉu kooperaj. Ekzistas ankaŭ malgrandaj des-

tilejoj, sed ili rapide malaperas kaj cedas al la grandaj.

Urboj, kie estas centralizita la komerco de rozoleo estas Kazanlik kaj Karlovo. Krom tio en la valo estas multaj belaj vilaĝoj. Kazanlik estas bela urbo kun 12,500 loĝ. Ĝi estas fama en la mondo kiel centro de la rozolea komerco. Karlovo estas pli malgranda (8,000 loĝ) kaj ne tiel fama, malgraŭ ke nun en ĝia ĉirkaŭaĵo estas pli multe rozĝardenoj kaj estas produktita pli multe da rozoleo. La roza valo estas nomata la Kazanlika Roza Valo.

La Rozan valon famigis plej multe la germanaj vojaĝantoj: Moltke, Kanic, Bart, Hohšteter. La unua, fama prusa militisto, vojaĝis kaj vizitis Kazanlik dum 1883 j. Li en sia admiro nomis la urbon Eŭropa kaŝmiro kaj Turka Gjulistan. Krom tio la Roza valo estas vizitita, admirita, glorigita kaj famigita de multaj aliaj historiistoj, geografistoj kaj vojaĝantoj kiel D-ro Ireček, Kánčev, de niaj poetoj Karavelov, Vazov kaj multaj aliaj. Sed la priskribo estas malforta doni veran bildon de nia bela fama roza valo. Vi devas ĝin persone viziti kaj vidi kiom malavara estas Dio kolektante en unu malgranda valo tiom multe da belaĵoj kaj agrablaĵoj. Do, vizitu ĝin kaj vi restos kontentaj!

KIAM ESPERANTO VENKOS?

De Karl Kröber, Riesa, Germ. administranto de Internacia Pedagogia Revuo.

La sukcesoj de la lastaj jaroj, kiujn ni spertis dank al la „diligenta kolegaro“ en tutmondo donas al ni kuraĝon ekde-
mandi: **Kiam Esperanto venkos?** Kaj jam antaŭ jardeko post la malfeliĉa milito oni nur riskis la demandon „Ĉu Esperanto iam venkos?“. Por hodiaŭ jesi tiun demandon, oni ne devas esti kuraĝemulo, spertinte, ke Esperanto pruvis sian oportunecon kiel bona, klara kaj bela komprenilo ne nur dum Esperanto kongresoj ciujaraj, sed ankaŭ en internaciaj fakaj konferencoj, komercaj, religiaj, politikaj kaj sciencaj. Jam ekestis la tempo, en kio la praktikulo gajnas monon per la preferoj de internacia lingvo kaj ni preskaŭ ne bezonas propogandi Esperanton en rondo de la komercistaro, ĉar la komercisto ne plu povas stari malproksime, kiam la granda internacia komerco kaj la internaciaj foiroj scias gajni monon per la uzado de Esperanto, per la plifaciligado de la internacia korespondado. Sed sole per tiu fakto Esperanto ne venkos, se ne helpas diligenta kolegaro atingi la finan venkon per alia vojo kaj tiu vojo estas la junularo, kiu portas en si la estontecon, la estontan venkon. „Kiu havas la junularon, tiu havas la estontecon“. Pro tio ni nur plej bone

povas helpi atingi la celon, se ni zorgu havigi la junularon. Nun estas tute klara la vojo, la vojo kondukanta en la lernejon al la infano: Ni demandas: ĉu oni jam trovis la vojon, kie kaj kiel? Verŝajne oni estas emaj jesi la demandon, ĉar tie kaj tie oni legis pri enkonduko de Esperanto en la lernejon, sed tio estas eraro, ĉar oni ofte faris la duan paŝon antaŭ la unua. Necesega antaŭpaŝo volonte estas forgesata: la havigo de la instruistaro. Estas vero, ke instruistoj en tiu kaj tiu lando esperantiĝis, sed tiu ne estas la instruistaro, kiun ni bezonas, por iri la vojon en la lernejojn. Estas interese respondonte la demandon: Kiam Esperanto venkos? ni superrigardas la staton de la Esperanto-instruistaro en la mondo.

Mia ofico en la Tutmonda Asocio de Geinstruistoj Esperantistaj permesas al mi, havi tiun superrigardon de la Esperantistaj instruistoj kaj estas bona afero kaj granda merito, se la direktoro de la Germana Esperanto - Instituto Prof. D-ro Dieterle scipovis kolekti la respektindan nombron de preskaŭ 5000 instruistaj Esperantistaj adresoj el la tuta mondo. Estas ankaŭ tre bona signo, se sole en unu Germana provinco estas pli ol 400 Esperantistaj instruistoj, kiuj estas membroj de ia fakasocio kaj abonantoj de la fakorgano »Internacia Pedagogia Revuo«, en Saksujo! Estas samĝojiga fakto, ke en Anglujo, en la lando de la „nacia mondlingvo“, la nombro de la Esperantistaj instruistoj ĉiam grandiĝas! Kaj nun la demando estas interesa: Kiun pozicion havas Bulgarujo en tiu grava afero? En la Tutmonda Asocio por Geinstruistoj Esperantistaj troviĝas nur kaj 10-dek bulgaraj. Nur per kunigo de ĉiuj fortoj en la fakorganizado tage kaj la fakorgano Internacia Pedagogia Revuo (IPR) ni povos iri la gravan paŝon kun la instruistaro en la lernejon al la junularo, kiu gvidos nin al la fina venko. Kaj la fina venko ne estos tre malproksime, se ĉiu bulgara esperantisto instruisto trovos la vojon al la internacia fakorganizacio TAGE, kies tasko estas: per kunigitaj fortoj bone kaj zorgeme prepari la gravan ĝeneralan enkondukon de Esperanto en la lernejojn de tutmondo. Pro tio: ĉiu bulgara esperantisto instruisto helpas alproksimigi la finan venkon, se li helpas per aliĝo al sia internacia fakasocio kaj ĉiu neinstruista bulgara esperantisto helpas al la sama celo, se li atentigas la instruistojn pri tiu grava devo. La reprezentanto de TAGE en Bulgarujo volonte akceptas la aliĝojn kaj estas ĉiam preta, prizorgi provexemplerojn de la fakgazeto: Internacia Pedagogia Revuo. Adreso: Ivan Sarafov, Golemo-Selo Kazanlika reg. La bulgara Esperantista Instruistaro pruvos, ke ĝi estas preta, helpi manenmane kun la tutmonda instruistaro atingi la finan venkon: **Kun la instruistaro en la lernejojn al la JUNULARO!**



E N K E T O .**Kiel, kie kaj kial mi estigis esperantisto**

Estis aŭtuno dum 1919. Estinte en la kvara klaso de la gimnazio en Ruse, hejmenreveninte hazarde min atentigis allogenda afiŝo. kiu anoncis la publikon pri kursmalfermo de lingvo internacia nomata „Esperanto“. Mi unuan fojon aŭdis pri tiu facilernebla lingvo — strangaĵo por mi!

Mi nekredeme vizitis la kurson, ĉar mirinda estis dum periodo de malonga tempo oni studi lingvon fremdan kaj apliki ĝin kiel batalilo de interkompreniĝo kun alinaciuloj.

La kurson partoprenis 150 p. La kurso estis gvidata rezulte de s-ro Ilia Silvestriev, subkolonelo en la infanteriarmejo de Ruse. Dum du monatoj la kurso fabrikigis la unuajn esperantistojn. En rondo esperantista kunveniĝadis la gesamideanoj. Mi baldaŭ forlasis ĉi rondon pro miaj lerneaj devoj, kaj rapide mi forgesis la lernitan lingvon. Miaj kunkursanoj jam ĉiu vespere babiladis, konversaciadis en Esperanto. Ofte mi ĝenis pro mia pasiva partopreno en la dolĉaj interparoloj. En la jaro 1923 ambiciego min stimulis al fervora restudo de Esperanto.

Streĉe mi sopiris konvinkigi min pri la literatura trezoro de la artefarita lingvo, kiun mi konsideris nur neaplikebla en la vasta tavolo de l'vivo „Literatura mondo“ konatigis min kun la talentaj verkistoj: Julio Baghi, Hilda Dresen k. a. kaj la kontakto kun la esperantistaro tutmonda plene ĝuigis min. La esperanto kongresoj en kaj eksterlande emocie farigis min fida kaj entuziasma propagandisto en ĉiuj sferoj.

Dimitr Ivanov — Ruse.

Какъ и защо станахъ есперантистъ

И азъ отдавна си поставяхъ този въпросъ, но сега из-ползвайки вашата анкета, настиламъ на хартия споменитѣ ми.

Това бѣше презъ време на свѣтовната война, когато ми попадна единъ учебникъ за Есперанто. Макарь малкъ, 11 годишенъ, съ интересъ разглѣдахъ книгата и я запазихъ...

Следъ 4 години, имайки разговоръ съ единъ ученикъ отъ лица за международенъ езикъ, казахъ му че притежавахъ такава книга и я продадохъ.

Презъ 1926 г. Есперанто наново се зароди въ менъ и единъ другаръ отъ Силистра ми донесе учебникъ отъ Ада, ключъ и значка. Започнахъ усърдно да уча. Влѣзохъ въ

връзка съ Ромън. Есп. Съюзъ. Понеже въ града бѣхъ изолиранъ, се обезкуражихъ и ентузиазма спадна, но не изчезна.

Споменахъ на приятеля си Д-ръ В. П-въ, че се занимавамъ съ Есперанто; даде ми куражъ, като почна и той да изучава езика.

Въ 1927 год. почнахъ да се занимавамъ съ публицистиката. Това ме накара сериозно да гледамъ на Есперанто и да изуча добре неговата сжщностъ.

Следъ година дойде при менъ г. Морариу, сега въ Швеция, който ме помоли да му дамъ съдействие за откриването на есперантски курсъ въ Кюстенджа.

Чрезъ него усвоихъ по здраво езика.

Честото четене на разни есп. книги и списания ми помогна да зауча думи безъ голѣмъ трудъ.

Посещението на двама съидейници миналата година — датчанинъ и полякъ — ме накара още по идеално да гледамъ на Есперанто.

Увѣренъ сжмъ че Есперанто, най-сетне ще завладѣе свѣта за доброто и мира на човечеството.

Д. Н. Минчевъ, публицистъ — Кюстенджа.



Kiam, kial, kiel mi lernis Esperanton?

En 1919 estinte komunuma oficisto en v. Dve-Mogili, por unua fojo mi aŭdis pri Esperanto, de iu amiko — instruisto ĉe la loka progimnazio.

En 1922. ankaŭ iu amiko, mia kolego, intencinte lerni la lingvon, konfidis sian intencon al mi. Mi tuj akceptis la proponitan ideon. Tio okazis dum la tago, kiam estis malfermata esperanto kurso en nia klubejo.

Post fino de la laboro, ni iris tien ambaŭ. La iniciatinto pri la malfermo de la kurso ne ĉeestis dum la sama vespero. Lin anstataŭigis lia fratino - same komencantino. Ŝi okupis nin dum kelkaj minutoj per esperanto. La sekvantan vesperon venis la lektoro. Ĉiuj ĉeestintoj estis entuziasmigitaj. Post 2-3 lecionoj la entuziasmo estingigis, ĉar la studado estis embarasigita de la policistaro, pro politikaj kaŭzoj. Apenaŭ en la komenco de marto 1924, promeninte sur la strato, haltis min lv. Josifov - fervora esperantisto, kiu


proponis al mi, akompani lin al la lernejo, kiel oni lernas la lingvon.

Volonte, mi akceptis la proponon. Reekbruligis min la nova sento, por neniam estingiĝu. Tia maniere mi vizitis la kurson. La du trionoj de la materialo estis jam pasigita, sed mi ne perdis la esperon. En mallonga tempo dank'al persista legado kaj tradukado de la ekzercoj, hejme, mi ĝuis la belsonan kaj tre facilan lingvon. Post unu monato, mi jam parolis flue esperanton.

Rimarkinde estas, ke mi ĉiam preferis la interparoladon, precipe kun perfektuloj. La rezultoj estis belegaj.

Dum la Paska festo ĉeestis la amuzfeston de nia societo „Espero“ Andreo Ĉe k. a. Kun ĉiuj mi parolis libere, dum alilingve, mi restus kiel muta. Dum la XI (enl. k.) mi komprenis la sencon de i. l., kaj neniam mi ĉesos uzi kaj propagandi ĝin, kiel ĝis nun, por la feliĉo de la unua sopiranta paconsklavaro kaj la estonta homaro.

Dimitr Petkov — Ruse.



Kial mi estiĝis esperantisto.

Dum la 1928 j. mi estis policano en Bjala. La saman jaron mi estis sendita, por ke mi studu polican kurson en urbo Ruse.

Ĝis tiam mi ne estis aŭdinta pri Esperanto. Je la fino de la polica kurso alvenis unu lektoro, kiu parolis al ni pri Esperanto.

Li estis feliĉa instrui al ni nur la alfabeton, akcentinte la celon de Esperanto. Tiam mi tre interesiĝis kaj pripensis bone ke Esperanto estas bezona al ni ĉie.

Mi finis la polican kurson kaj revenis en nian urbon, kaj ekserĉis esperantan lernolibron. Feliĉe mi trovis tian.

Jam mi komencis fervore la lernadon. Post kelkaj tagoj mi estis deĵoranta sur la placo, kaj jen alvenis unu aŭtomobilo plena je fremduloj. Ili deman-

dis min, ĉu mi parolis esperante, sed bedaŭrinde mi povis respondi al ili nenion, ĉar mi estis tute nova esperantisto.

Pro kolero kaj ambicio, mi ĉiutage okupis min je lernado pli intense. Post unu monato, mi estis en korespondado kun alilandaj esperantistoj.

Jen kiel esperantisto, mi komprenis ke esperanto estas utila al la homaro.

Ĉiuj lernu esperanton kaj kun fier'antaŭen.

Ivan K. Minĉev — Bjala.



SONĜO

Dediĉe al F-ino E. C.

Alba-Julia.

Post fino de l' tago frivola

Dum nokto en sonĝo nevola

Sur kampo vin solan mi vidis, —

Enmeze de floroj tre belaj

Kaj inter anĝeloj ĉielaj

Sur trunko majeste vi sidis!

Kun liro gracie tenanta

Kaj voĉo perfekte tremanta

Vi igis anĝelojn dancadi, —

Kaj via ĉarmeco feina

Kaj nobla aspekto diina

Min igis sufoke spiradi!

Kaj ju vin mi tiam observis

Des pli en koro konservis

Jo dolorige ardanta, —

Kiu per sia ĉeesteco

Kaj certa efika forteco

Min tenos por ĉiam amanta!

Iv. Kovaĉev.

LINGVAJ STUDIOJ.

Сравнения - съпоставяния.

Тѣ сж добро срѣдство за осигуряване на възприемането. Посредствомъ тѣхъ ние схващаме разликата или подобие на две части на речта, разбираме по-добре и едната и другата частъ и осигуряваме тѣхното запомняне.

Ето и нѣколко такива сравнения - съпоставяния:

1. **ul** — наставка, която означава лице съ качество показано въ корена.

aĵ — наставка, която означава предметъ съ качество показано въ корена.

Сравняваме дветѣ наставки. И дветѣ изразяватъ качество. Разликата се състои въ това, че едната означава лице, а другата предметъ. Друга разлика между тѣхъ нѣма.

es — наставка, означава качество, което притежава известно лице или предметъ.

Съпоставена съ горнитѣ две наставки, ние ще видимъ, че тя изразява качеството, което се съдържа въ тѣзи две наставки.

Примѣръ: *Belulo* - красивъ човѣкъ, красавецъ; *belaĵo* - красиво нѣщо; *beleco* - красота.

La belulo kaj la belaĵo posedas belecon.

Красивиятъ човѣкъ и красивото нѣщо притежаватъ красота.

2. Прилагателнитѣ сж пояснение на сжществителнитѣ.

Наречията сж пояснения на глагола.

Питаме съ сжществителното за да откриемъ прилагателното и питаме съ глагола за да откриемъ наречието.

Примеръ: *Luma tago* - свѣтълъ день. *Kia tago?* *Luma.* Питаме съ сжществителното, значи — прилагателно е.

Tage estas lume — денемъ е свѣтло. *Kiel estas?* - *Lume.* *Kiam estas?* - *Tage.* Питаме съ глагола, значи *tage* и *lume* сж наречия.

3. **Malgraŭ** — въпреки; предлогъ и като такъвъ винаги го среќаме предъ сжществителнитѣ.

Kvankam - макаръ, че, при все че; съюзъ и като такъвъ, среќаме го предъ глаголи, като свързва 2 изречения.

Примеръ: *Malgraŭ la bona vetero, mi iros.* — Въпреки лошото врѣме, ще отида.

Kvankam la vetero estas malbona, mi iros. — Макаръ, че времето е лошо, ще отида.

Погрѣшни сж изразитѣ: *Malgraŭ (ke) la vetero estas malbona....* или *Kvankam la malbona vetero,....*

Забележка: Нека се обърне внимание на това, че следъ *kvankam* съюзътъ **ke** не се употрѣбява. *Kvankam* е

съюзъ, а единъ съюзъ е достатъченъ за да се изрази мисълта ни.

4. IOM - малко но не опредѣля точно какво количество.

Malmulte - малко. Тази дума натъртва на понятието малко. Тя получава логическото ударение и съ това показва засилване на понятието малко (противното на много).


Примѣръ: Li alportis iom da pano kaj mi kontentigis mian malsaton. — Той донесе малко хлѣбъ и азъ задоволихъ глада си.

Li alportis malmulte da pano kaj mi ne povis satiĝi. — Той донесе малко хлѣбъ и азъ не можахъ да се наямъ.

Забел. Добри сравнения-съпоставяния си образуваме съ предлозитѣ но за тѣхъ въ друга статия.

D. S.

*) Предлагамъ настоящата статия на благосклонното внимание на начинаещи и ръководители. За напреднали, може би, тя не ще представя голѣмъ интересъ.



Изправлямъ се „rektiĝi“, или „stariĝi“?

Глагольтъ „изправлямъ“ се произлиза отъ прилагателното правъ, което има по-вече отъ едно значение и на Есперанто се превежда:

Правъ — rekta, staranta, prava.

За последното значение на тази дума на Есперанто тукъ не става въпросъ.

Rekta правъ (обратното на кривъ): rekta linio.

Rektigi (igi, ion rekta) изправлямъ, оправямъ.

Rektiĝi (iĝi rekta) изправлямъ се, оставамъ правъ (въ сжщата смисълъ, както въ примѣритѣ: права линия, права посока).

Stari стоя правъ (изправенъ), стърча, съмъ правостоящъ; **stariĝi** изправлямъ се, ставамъ, ставамъ правостоящъ.

Долнитѣ примѣри поясняватъ мисълта ми:

1. Kuŝinte kelkajn minutojn, li rektiĝis kaj daŭrigis kuŝi rekta.
2. Kuŝinte kelkajn minutojn, li stariĝis kaj ne plu kuŝiĝis.

Първото изречение ще преведемъ:

Като лежå нѣколко минути, той се изправи (изпъна тѣлото си) и продължи да лежи правъ (не свить).

Второто изречение ще преведемъ така:

Като лежå нѣколко мннути, той се изправи (стана правъ, правостоящъ, на кракъ) и не легна по-вече.

Явно е, че значението на думитѣ „rektiĝi“ и „stariĝi“ е различно. Разбира се, когато човѣкъ е „staranta“ той е и, rekta, но обратното не всѣкога е вѣрно.

Ако става въпросъ starigi ли да употребимъ или ekstari ще кажа, че и дветъ сж удобни. Думата starigi е по-позната и по-употрѣбявана, при все че ekstari е по-логична, както и екуŝi е по-логична отъ kuŝigi, eksidi отъ sidiĝi.

За последния примѣръ вижъ „Lingvaj respondoj“ стр.26.

S. St. H.



Dek Reguloj por Radio - amikoj

1. Aŭskultu la Esperanto-dissendojn: ili estas farataj por vi!
2. Se vi mem ne posedas ricev-aparaton, aŭskultu ĉe konato: tiel vi samtempe propagandas Esperanton!
3. Sendu al la Radio-stacioj, precipe eksterlandaj, informon pri viaj observoj kaj deziroj: tiel vi utilas al Radio!
4. Skribu mallonge, objektivе kaj klare: en la sendostacioj oni havas multan laboron, sed malmultan tempon!
5. Al stacioj sur la teritorio de via propra lingvo skribu eu ĉi tiu, al eksterlandaj stacioj — en Esperanto: tiel vi respektas la rajton de la gepatra lingvo kaj tiun de Esperanto!
6. Varbu ĉe viaj konatoj por Esperanto kiel Radio-lingvo: tiel vi varbas pri egala rajto por ĉiu!
7. Instigu viajn konatojn, precipe eksterlandajn, komuniki al la Radio-stacioj observojn kaj dezirojn pri Esperanto-dissendoj: la stacioj bezonas tian eĥon el la aŭskultantaro!
8. Postulu Esperanto-dissendojn, ne nur kursojn; antaŭ ĉio postulu por internaciaj aranĝoj la internacian helplingvon: por universala Radio — la universala lingvo Esperanto!
9. Postulu, ke via Radio-gazeto publikigu la programon pri Esperanto dissendoj: la redakcioj volente plenumas la dezirojn de legantoj!
10. Komuniku viajn observojn, kiel aŭskultanto de Esperanto-dissendoj, al la komisiono por internacia statistiko pri Esperanto-dissendado (adreso: Johannes Jungfer, Lübben, N.-L., Lindenstr. 10, Germanio): tiel vi utilas al Radio, al Esperanto, pieje al vi mem.

Alvoko al la esperantista virinaro.

Sciigo pri la „Unuiĝo de esperantistaj virinoj“.

Laŭ teksto de nia raporto en la oktobra numero de «Esperanto» la virina kunveno dum la XXI-a kongreso en Budapeŝt decidis unuigi la virinfortojn esperantistajn por du celoj:

1. helpo por akiri rajtojn al la virinoj,
2. antaŭenigi la pacmovadon.

En tiu senco mi redaktis regularon kaj petas aprobon de la esperantista virinaro.

Ĉar la elspezoj en la komenco ne estos grandaj (nur poŝt-kaj eventualaj preskostoj), mi proponos, ke ĉiu aliĝontino almetu al sia aliĝa letero kvindek-centiman respondkuponon — aŭ egalvaloron de kvindek svisaj centimoj — kiel jarkotizo por 1930. Tiu sumo estu deviga, sed pligrandajn oni povas sendi laŭvole. Nia prezidanto, s-ino Marcelle Tiard jam sendis 100 francajn frankojn (hung. Pengo 22.30) kaj mi almetis la saman sumon, por ke nia kaso — kiun mi prizorgas — enhavu almenaŭ la unuajn enspezojn.

Kiel la unua punkto de nia programo montras, nia „Unuiĝo de esperantistaj virinoj“ estas starigata en intereso de ĉiuj virinoj, t. e. ne nur por plenkreskulinoj, sed ankaŭ por la junularo, kiujn ni povos helpi en multaj rilatoj. Pro tio estas nepre dezirinde ke aliĝu ankaŭ knabinoj kaj junulinoj.

La de mi preparita regularo estas jena:

- 1) Ĉiu anino de la „Udev“ havas la devon morale helpi la unuiĝon en ĝia laboro.
- 2) La „Udev.“ havas la devon helpi, t. e. doni moralan apogon al siaj aninoj dum ilia lukto por virinrajtoj kaj dum ilia laboro en intereso de l' paco.
- 3) La aninoj de la „Udev.“, interrilatigu kun la feministaj societoj de la koncernaj landoj kaj helpu ilin dum lukto por virinrajto kaj paclaboro.
- 4) La aninoj da ĉiu lando elektu inter si korespondantinon, kiu havos la devon informi la sekretariinon de „Udev.“ pri nove akiritaj rajtoj de virinoj kaj pri paŝoj faritaj en intereso de l' paco en la koncernaj landoj.
- 5) La sekretariino havas la devon sciigi — pere de la gazetoj — al la „Udev.“ pri la novaj akiritaj aŭ pri la paŝoj en intereso de l' paco en ĉiu lando.
- 6) La sekretariino havas la devon fari ĉiujare raporton pri la farita laboro kaj pri stato de l' kaso kaj laŭtlegi ĝin dum la virina fakkunveno de l' kongreso. (En kazo de neĉeesto, ŝi sendu la raporton al anstataŭantino).
- 7) La „Udev.“ kiel tuto kaj siaj aninoj unuope havas la devon antaŭenhelpi la pacmovadon t. e. influi siajn idojn aŭ lernantojn en tiu senco.
- 8) Dum laboro por virinrajtoj aŭ en intereso de l' paco la aninoj de la „Udev.“ havas la devon oficiale akcenti ke ili agas en nomo de la „Udev.“
- 9) Ĉiu anino havas la rajton peti moralan apogon kaj konsilon de la „Udev.“ por sia agado ĉu en paca kampo, ĉu dum lukto por virinrajtoj.
- 10) Ĉiu anino havas la devon pagi la modestegan jarkotizon.

Proponojn por plibonigo aŭ pligrandigo de tiu regularo oni bonvolu sendi al mia suba adreso.

La sekretariino

S-ino Nora Kozma — Budapeŝt VI., Andrassy ut 5.

ЧРЕЗЪ И ЗА ЕСПЕРАНТО

У насъ. I. С. К. съ особено писмо е благодарилъ на г. Директора на П. Т. Т. по случай окръжното съ което се препоръчва изучаването на Есперанто отъ т. пощенци и за открития курсъ при Главната Дирекция.

Intern. Ligo de esperantista poŝt kaj telegraf - oficistaro (Berne) съгласно решението на 12 и всевътски конгресъ на Лигата (Будапещъ, Августъ 1929) изпрати писмо до г. Министра на Желъзницитъ П. и Телеграфитъ съ което моли да се разгледатъ следнитъ въпроси: а) да се препоръча изучаването на Есперанто отъ п. т. т. чиновници; б) Есперанто като задължителенъ езикъ при професионалнитъ изпити. в) употреба на числителнитъ есперантски имена; г) да се изпрацатъ официални представители на всевътскитъ есперантски конгреси; д) да се предложи употребата на есперанто въ прекитъ съобщения между разнитъ п. т. т. администрации и конгреси.

Дюселдорфъ (Германия) трамвайния персоналъ носи на ржката си лента съ надписъ „Esperanto parolata“ (говори се есперанто).

Унгария. Правителството, по право минист. председателя, е далъ 2000 пенгъо (около 50000 лева) като субвенция на унгарското еспер. дружество.



XVII-a Bulgara Esperanto Kongreso

12. — 14. VII 1930.

La kongreso de la bulgara esperantistaro nunjare okazos en Sofia dum 12-14 de Julio. La veturo sur la fervojo estas por en kaj eksterlandaj gesamideanoj duonpreze rabatita.

Senpaga vizo por la eksterlandaj esperantistoj ricevebla ĉe la bulgaraj legacioj kaj konsulejoj

Por loĝejoj, aliĝiloj kaj certigiloj por duonpreza veturado surfervoje petu la Kongresan Komitaton — Sofia (Bulgarijo) poŝtkresto 233. Alilandaj esperantistoj anoncu sin frue al la kongreskomitato.

Tutbalkana Konferenco de Esperanto estas okazigota ankaŭ en Sofio dum la kongrestagoj.

ОКОЛО КОНГРЕСА

1. Искано е 5 дневенъ отпускъ. Разрешено е пжтуване по намалена тарифа по Б. Д. Ж. Увѣрнения да се обгербватъ: I класа — 7 лв., II — 5 лв. и III — 3 лв. Всѣки да носи съ себе си и чл-ската си карта **непремено**. На чл. карта да се залѣпи и портретче, Датата на чл. карта да не бжде по-късна отъ м-ць Мартъ. Всичко това се изисква въ изпълнение на новиятъ „Правилникъ за намал. пжтуване по Б.Д.Ж.“

Това непремено да се спазва за да не се явятъ неприятности по пжтуването.

2. За увѣрнения и други сведения да се обръща направо къмъ конгресния комитетъ — **София, пощенска кутия 233.**

3. Проектира се произвеждане изпитъ за добиване право на лекторство. Ще се издаватъ и дипломи.

4. Съгласно устава на всѣки 10 или дробъ отъ 10 отъ числото на отчетенитѣ членове, се избира единъ делегатъ. делегата непременно трѣбва да бжде отчетенъ членъ.

5. Дружествата да свикатъ събрание, да избератъ делегати, като имъ дадѣтъ пжлни инструкции по въпроситѣ отъ дневния редъ.

6. Отчета на Ц. К., заедно съ дневния редъ ще се разпрати своевременно.

7. Препоръчва се групово пжтуване. Близкитѣ дружества да уредятъ помежду си този въпросъ. Да не се забравя носенето на флагове.



DIVERSAJ.

Aliĝu senprokraste al 9-a eldono de **BES—ADRESARO** de esperantistoj el ĉiuj landoj, kiu celas kolekti adresojn de ĉiuj esperantistoj. Simpla aliĝo 0.50 Fsv. kun adresaro I.-Fr. sv, kun portreto kaj adresaro 1.50 Fr. sv. Anonca paĝo 25 Fr. sv. Postulu senpage detalan prospekton de l' eldonanto:

BES (Boh. E-Servo) POTŠTEJN Ĉisl, Eŭropo.

Esperantistoj atentu! La plej granda bulgara revuo „Bulgarska kniga“ (Bulgara libro) en Sofio enkondukis Esper. Fakon redaktata de nia samideano Ivan H. Krestanov, L. K. En ĝi estas speciala kolono: Revuo de la peranto-gazetaro pri Bulgarujo“. Tial, por la bono de nia afero mem, ĉiuj esp redakcioj estas petataj sendi po unu ekz. de ĉiuj n-roj, kiuj enhavas ion ajn pri tiu lando Antaŭan dankon!

Adreso: Iv. H. Krestanov, ul. „6 Septemvri“ 28, Sofia, Bulgarujo.

La fama „Elektroteknika Instituto“ de l'Universitato de Grenoble konsentis reklami per Esperanto. De multaj jaroj la diversaj fakoj de la Grenoble' a Universitato akiris tutmondan famon. La supera elektrolernejо estas nur aparta sekcio de la Politeknika Instituto ĉe tiu Universitato

Kongresoj. XVII-a Bulgara Esperanto Kongreso en Sofia, ĉefurbo de Bulgarujo, 12-14 de Julio.


IV Kongreso de Universala Ligo por seksa reformo sur scienca bazo. 13-20 Sept 1930 en Wien.

Fervojista Esperanto-kongreso en Hirschberb. — Riesen-gebirge: 21-24 de Junio 1930.

Korespondado. Holandaj tramistoj deziras korespondi kun alilandaj kolegoj. Adreso: „Ĉiam antaŭen“, sekretario D J. Alberts, Noorderbeckstraat 192, Den Haag (Holando).

Jenaj personoj el du instruistaj kursoj deziras korespondadon:

1. Anton Hame, Molkestr. 1 Löbau, Germanujo (Saksujo).
2. Paul Ronsch, Jahnstr. 5 „ „ „
3. Erich Sandt, Goethenstr. 7 „ „ „
4. Johanues Geyer, Romborgestr. 7 Lobau, German. (Saksujo).
5. Bruno Scesny, Badergasse, 5 „ „ „
6. F-ino Loise Förster, Wiesenbergerstr. 1 „ „ „
7. F-ino Johanna Reichardt, Lundenstr, 5 „ „ „



★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★
★
★ **LA ESPERANTO-MOVADO** ★
★
★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★

Enlando

Ruse. Ĉe la poŝtstacio funkcias kursoj kun 8 p., gvidata 3 foje dum la semajno de s-no D. Ivanov. La 5-an de Majo la sekretariino de esp-to societo „Solidareco“ forveturis Germanujon al sia fianĉo. Kiel nova societsekretario dum la kunveno je 25 majo oni elektis D. Ivanov. La lokaj taggazetoj „Rusenska Poŝta“ kaj „Dunavska Tribuna“ ofte aperigas artikolojn pri la tonfilmo, esperanto kaj ĝiaj sukcesoj de nia senlaca pioniro Dim. Ivanov.

У насъ

Ruse. При пощ. станция функционира курсъ ржководенъ 3 пъти седмично отъ съидейника Д. Ивановъ. На 5 май секретарката на есп. д-во »Солидарность« отпътува за Германия при своя годеникъ. Въ събранието на 25 май се избра, като новъ секретаръ на д-вото Дим. Ивановъ.

Мѣстнитѣ ежедневници „Р. Поща“, „Д. Трибуна“ често помѣстватъ статии за тонфилма и успѣхитѣ на Есперанто съставяни отъ неуморимия пионеръ Д. И-въ.

Stanimaka. Dum la pasko okazis la dua sudbulgara konferenco. Partoprenis 70 p. Oni elektis departamentan propogandkomitaton.

Sofio. Loko de sudokcidenta konferenco, kiu okazis dum 24-25 de majo. Partoprenis 50 p. La s-no Iv. H. Krestanov per la semajna ilustrita gazeto „Kragosvet“ dissendis kiel premion al la legantoj 4,000 ekz. da 16 pĝ. gramatikoj esperantaj. Artikolo pri la tonfilmo kun portreto de Zamenhof.

Kirĝali. La 16. IV. 1930 publika organizparolado Projekcio de la filmo Budapesta Universala Kongreso de Esperanto. Restarigo de la societo „Stelo“.

Varna. Kurso por gepoŝtofistoj kun 30 personoj; gvidas la s-no G. Dolapčiev.

Станимъка. На Великденъ се състоя втотата южнобълг. конференция. Участваха 70 души. Избра се окр. пропагандиченъ к-тъ.

София. Мѣстна югозападна конференция, която се състоя на 23-25 май. Съидейника Ив. Х. Кръстановъ раздаде като премия на читателитѣ на седмичното илюстровано списание »Кръгосвѣтъ« 4000 брошури отъ 16 страници еспер. граматика. Статия съ портрета на Заманховъ.

Кърджали. На 16 IV 1930 публично организац. събрание. Проектира се филма Универсалния Конгресъ на Есп-то въ Будапеща.

Варна. Курсъ за пощ. чиновници отъ 30 души се води отъ съидейника Г. Долапчиевъ.



Garbo, originala poemaro de Asen Grigorov, Eldonejo „Pelikan“, Sofio, 1930. 12 × 16 sm, 30 pĝ. Prezo 10 leva.

Nia originala literaturo ĉiam pliriĉigas kaj tiel plifirmigas la vivdaŭron de nia kara lingvo. Jen bele eldonita kaj ĝue legebla libreto. Aĉetu ĝin tuj! Vi lernos ion de la bona lingvo kaj interesa enhavo.

Jarlibro de Lingva Komitato kaj de ĝia Akademio 1930; prezo 2 fr. Eldono de Esperantista Akademio.

Eldonaĵoj de „Heroldo de Esperanto“, Köln, Brüsselerstr. 94, Germanujo.

Erich Marie Remarque: „En okcidento nenio nova“. Kun portreto de la aŭtoro. Broŝurita RM 5.—, tuttole bindita RM 7.—.

Storm (Heitmüller): Du majstro - noveloj. (La Blankĉevala Rajdanto, kaj: Violo trikolora.) Broŝurita RM 2.40, bindita RM 4.—

Stellan Engholm: Al Toreno. Novelo originale en Esperanto. Prezo RM 1.50.

D-ro Trögel (Schröder): Esperanto kaj kulturo. Prezo RM 0 80.

Fratoj Grimm. Du fabeloj. Prezo RM 0 30.

Katalogo de Esperantaj kaj bulgaraj libroj, 1930. Agentejo „Pelikan“ str. Alabinska 19, Sofia.

Nord-Amerika Esperanto Almanako por la jaro 1930, eldonita de la Esp. Asocio de Nord-Ameriko.

La Mortado de prof. D-ro H. Nohnagel. Eldono de esp to s-to „Progreso“ Wien X Ettenreichgasse 4 3'. Prezo 1 RM.

Бюджетни бележки.

РАВНОСМЕТКА

за прихода и разхода отъ 16 юлий 1929 г. до 31 Май 1930 — включително.

ПРИХОДЪ

- | | |
|---------------------|------------|
| 1. Членски вноски | 6200.— л. |
| 2. В. Esperantisto» | 10410.— л. |
| 3. Verda semajno | _____ |
| 4. К. Р. | 1540.— л. |
| 5. Стока | 8464.— л. |
| 6. Дебитори | 522.— л. |
| 7. Непредвидени | 5449.60 л. |

Всичко 32585.60 л.

РАЗХОДЪ

- | | |
|---------------------|-------------|
| 1. „В Esperantisto“ | 11355.50 л. |
| 2. Verda semajno | _____ |
| 3. К. Р. | _____ |
| 4. Кредитори | 3961.— л. |
| 5. Наемъ канцелар. | 2856.— л. |
| 6. Канц. разноси | 4437.90 л. |
| 7. Заплата | 7600.— л. |
| 8. Осветл. и отопл. | 1020.— л. |
| 9. Плат. агитаторъ | 163.— л. |
| 10. Непредвидени | 1095.— л. |

Всичко 32488.40 л.

— ИЗЛЕЗЕ ОТЪ ПЕЧАТЪ — „ЕСПЕРАНТО - БЪЛГАРСКИ И БЪЛГ. - ЕСПЕРАНТСКИ“ — РЕЧНИКЪ —

III-то преработено и допълнено издание съ основна граматика отъ Ив. Х. Кръстановъ, съ предговоръ отъ проф. Д-ръ Ст. Младеновъ.

Искайте го веднага отъ издателя срещу 75 лв. неподвързанъ и 90 лв. подвързанъ

Умоляватъ се всички предплатили за него, особено дружествата да съобщятъ сегашния си адресъ, за да имъ се изпрати, това особено за ония, които сж го поръчали преди 2-3 години, и ако искатъ да го получатъ препоръчено да изпратятъ по 3 лв. Адресъ:
ул. „6 Септември“ № 28, София.